

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : MARTO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĵo :
Carme, 30 : BARCELONA

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



DRUVO de nia plena revigliĝo estas la organizado de nia IX^a Kongreso, okazonta en la grava urbo Girona dum la tagoj 15^a, 16^a kaj 17^a de la venonta Oktobro.

Certe ĝi estos la signo ke ni estos reatingintaj la antaŭan vivoplenan epokon; kaj la Ĝeronaj samideanoj certe senlace klopodados por daŭrigi kaj eĉ superi en la nunjara Kongreso la brilecojn de la pasintaj.

La nunjara Kongresurbo, pro sia graveco, pro siaj ravantaj historiaj kaj arĥeologiaj vidindaĵoj, pro la ĉarmo de siaj ĉirkaŭaĵoj kaj «Devesa» arbarego, pro la afableco de la enurbanoj kaj ĉefe pro la laboremo kaj fervoro de la tiea gesamideanaro, garantias al nia esperanta solenaĵo sukceson eksterordinaran, kiun pligrandigos amaso da katalunaj samideanoj jam de nun pretiĝantaj al ĝia ĉeesto.

Tutkoran dankon al la Ĝeronaj geamikoj, kiuj klare konsciis ke la IX^a Kongreso de nia Federacio kronos per hela maniero la intensan kaj revivigan poresperantan agadon kiun ni estas entreprenintaj.

Unueco



DE l' momento kiam la interhoma mortigado ĉesis kaj sur la sangokovritaj kampoj de Mezeŭropo la ruĥkaj teruraj pafiloj fariĝis silentaj, nia verda standardo denove potencigante, purigante la mortsaturitan aeron, ekflagris tra la tuta mondo dum nia koro, plene apartenanta al la sankta esperantismo, malfermiĝis al esperoj kaj ree la estonton ni ekvidis nia.

Hardita, forĝita sur pura amboso, el plej valora ŝtalo ellaborita, nia komuna lingvo kun sukceso travivis la ventegon, kiu bedaŭrinde forprenis el nia rondo neanstataŭeblajn kunbatalantojn, kaj vekante ĉiujn fidelulojn instigis nin al la laboro.

Iom post iom ĉiu posteno akiris defendanton, ĉiu grupo, ĉiu esperantisto revigliĝis kaj ĝenerale la tuta afero fariĝis grava kiel dum la antaŭmilita periodo, dum kiu konstante novaj adeptoj estis varbataj al niaj vicoj, certe ne multnombraj, tamen atentindaj pro ilia morala kvalito.

Kiel ĉiuj organizaĵoj kun internaciaj celoj, nia Federacio pro la milita skuo ankaŭ suferis la rezultatojn de la tutmonda konfuzo kaj sekve tiel same fariĝis preskaŭ senmova. Sed la intensa klopodado ĉie videbliganta postulis unuecon kaj ni neniom hezitis restarigi la disfalintajn fundamentojn por havi konstruaĵon ĉirkaŭ kiu grupiĝos niaj esperoj, kiuj poste danke al plena kunlaborado fariĝos realaĵoj, atingeblaj per la forto de nia konvinko kaj obstino de nia senĉesa laborado.

Ke ĉiu samideano venu al ni, ke ĉiu kunbatalanto alportu sian sableron kaj ni estas certaj, ke ni grupigos grandan nombron da esperantistoj, el kies unueco nia movado en Katalunujo eltiros grandan profiton kaj progresos pli ol iam.

Duboj, supozoj aŭ opinioj ke K. E. F. ne iras trafan vojon, ke ĝi sin regas per arhaika regularo, malaperu el ni, kaj anstataŭe ni interligu niajn fortojn, ni kuniĝu laŭ federacia sistemo, kiun ni opinias plej taŭga, tamen ni ne atendu restante flanke de la organizaĵo ĝis tiu ĉi per si mem alkonformiĝos al nia privata opinio, sed tuj partoprenu ĝin por veki aktivecon kaj samtempe montru dum la kunagado ŝaŭgojn enkondukintajn kaj vojojn ne irintajn ankoraŭ.

Nia lando estis ĉiam la avangardo de esperantismo en Iberio kaj sekve ni kuraĝas aserti, ke nia nuntempa nombro da federacianoj, certe tre grava jam, tre facile kvinobligus, se nur iom da persona konstanteco en la propagando por absoluta unueco streĉiĝus pli kaj pli kaj antaŭjuĝoj estus forjettaj por ĉiam, oferante niajn energiojn por la sankta idealo, kiun la Majstro tiel trafe sciis vibrigi en la fibroj de nia koro.

Tre ampleksa estas la laboro farota kaj kun plezuro ni komencis ĝian plenumon por atingi maksimuman forton. Peza tasko estas tiu de la Direkta Komitato sed ĝi antaŭ ĉio bone zorgu vigligi ĉiun grupon ekzistantan, ĝi al-

portu sian helpon al ĉiu urbeto kaj vilaĝo, ĉar nur kiam la grupoj atingas rimarkindan antaŭeniron kaj libere povas disvolviĝadi la potenco de federacio, sub la sankcio de la aliĝintoj, fariĝas frapa kaj impona por entrepreni seriozajn problemojn, kiujn ne sukcesus gvidi iu aparta senfundamenta grupo de kelkaj personoj kun difinita celo sed sen efektiva valoro.

Ni volas havi ĉiujn ĉirkaŭ ni kaj ni reciproke devas esti apud ĉiuj por ke la baldaŭ okazontaj elmontroj de nia movado en Zaragoza kaj Girona estu brilaj, kuraĝigaj kaj fruktodonaj pruvoj, ke nia fervoreco estas neelĉerpebla.

Ni ne riskos malsukceson se oni ĝuste komprenos nian alvokon, kies esencon oni objektive konsciu kaj pesu larĝanime sen personaj konsideroj, antaŭ kiuj ni metu ĉiam nian edifan senmakulan celon.

S. ALBERICH JOFRÉ.



Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj



UN la ĉefa celo starigi Iberian Esperantan Konfederacion, ĝi okazos en Zaragoza, de la 26^a ĝis la 29^a de Majo.

La Direkta Komitato de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO decidis aliĝi al ĝi kaj rekomendas ankaŭ la individuan aliĝon al la federacianoj.

Estas nenecese diri kian gravan taskon tia Kunveno plenumos, se dum ĝi oni starigas organizaĵon ligantan ĉiujn Federaciojn en la Iberiaj Landoj.

Ni esperas ke la Kataluna federacio povos oferi grandegan forton al tiu celo kaj rekte partoprenos la laboron de la Diskuta Kunveno.

Kredeble estas ke multaj samideanoj ĉeestos ĝin kaj ĝuos la afablecon kaj gastamon de la entuziasmaj Zaragozanoj.

Hispanaj Madrigaloj

(EL GUTIERRE DE CETINA)

Klar-okuloj, serenaj,
 kial, se vi, pro dolĉ-rigard' laŭditaj,
 min alrigardas, vi — enkoleritaj?
 Se ju pli kompatplenaj,
 des pli belaj vi estas vid-apere,
 ne rigardu kolere,
 por ke vi ne ekŝajnu malpli belaj!
 Ho, turmentoj kruelaj!
 Klar-okuloj, serenaj,
 eĉ se tiel, rigardu min almenaŭ!

Tradukis JOSEF GRAU

(EL FELICIANA ENRIQUEZ)

Diris Amor', sidante ĉe la bordo
 de rivereto pura, en silento;
 «Ne murmuretu, floroj,
 pro la sopir' de la volupta vento,
 ĉar se vekigos Galateo bela
 kun ŝia bril' ĉiela,
 post vido de l' koloroj
 ne plu vi estos floroj,
 nek mi Amoro, se okuloj plendas
 ĴCar sagojn tiel dolĉajn ili sendas!

Tradukis MARIAN SOLÀ

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj :

La Komitato de la VIII^{aj} INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. Traduko de la jena versaĵo :

EL MISTERI DE LA PRADA

Extesa vora el riu floreix la prada
sempre jove, frescal i envellutada...

A plè sol jo l'he vista
encesa de clarors, enlluernadora,
i també quan de nits se posa trista
perque la boira tot passant l'esflora.

La prada té un misteri;
només el sap que l'aigua, i perxò hi canta;
sota aquell tou de flors, què pot haver-hi
que tothom se la mira com a santa?

Fins la fada del riu, que en nits serenes
hi acotxa sa nuesa,
tot desfent-se les trenes
li pregunta el secret de sa bellesa.

Pro, eternament callada,
l'herba s'adorm, frescal i envellutada.

JOAN M. GUASCH

II. Traduko de la jena prozaĵo :

L' ESCARMENT

Deixa'm agafar aquell tramvia d'imperial. Estic arborat: necessito aire. Ja ha estat un bon escarment! No m'hi tornaran a pescar!

Feu plers a bèsties! Jo, que em feia tantes il'lusions, quan anava ajuntant els meus quatre sous! — Sortirem de la viu viu, — deia jo a la Quima — i farem les coses en gran. No consentiré que ningú pateixi a vora meu. Els meus amics, els meus coneguts, voldré que hi tinguin part, en la meva ufana, un cop estiguin negociades les terres que ens deixà l'oncle a en Graupera i a mi. Si us plau per força, he hagut de fer vida escanyada; però d'ara endavant tothom veurà que jo tenia el natural d'un príncep.

Bé s'escarrasava, la Quima:

— Lleó, pensa que en aquesta terra tot es genteta. No hi ha ningú amb un cor tan gran com el teu. Només colliràs que desenganys i disgustos. No hi ha cosa tan dolça i tan poc arriscada com és mirar per casa.

I jo... tabalot de mil... Fà quatre dies, com aquell qui diu, que tinc les coses en ordre: les tres quartes parts de mos cabals a casa el banquer, i tota una quarta part en cases de lloguer, per anar tirant i fer llargueses. Encegat pel meu somni de tota la vida, vinga convidar, dos dies la setmana, algun amic a pendre cafè; vinga donar qui sap les coses del parament vell de la saleta per a una tómbola; vinga pagar el tramvia a tots els coneguts; vinga fer un passament de vint duros l'any a la germana vídua de la meva dona, la que cus per altri; vinga regalar una caixa de cigars de contraban al notari, que no ens havia volgut cobrar res perquè som entreparents.

L... té: avui ens veiem amb el cosí Graupera, amb el qual ens hem parit l'heretatge de l'oncle, per determinar què n'haviem de fer, de la tartana i l'animal que l'oncle tenia per anar a la vinya. El fet que, segons el testament, fos de tots dos, ens entrebancava a l'un i a l'altre, perquè cap dels dos podia disposar-ne a pler; i jo em pensava que ho podriem resoldre ben bé a les bones.

En Graupera ha comprat terres de conreu, de manera que la tartana li pot fer servei: a mi amb prou feines em va bé d'amprar-la per anar algun dia a Sant Medí o a les vores del Besòs, a fer una berenada. El profit que ell pot treure de la tartana (ben clar li he dit) és més de quatre vegades del que n'aconseguiria jo. Li ho he demostrat en blanc i en negre: ell no ha tingut més remei que confessar-ho.

I jo, aleshores, per donar un cop que enlluernés aquella ànima roïna, li he dit:—Doncs bé: encara que tu hauries d'oferir-ne quatre vegades més del que jo n'oferís, d'aquesta cosa que per a mi no és de cap servei i que per a tu és un fòtil de primera necessitat, et faig aquesta proposició: o bé jo et dono tres centes pessetes, i la tartana queda per meva, o bé tu m'en dones només que quatre centes, i queda per teva.

Ah, fillets! En lloc de badar la boca davant la meva magnificència, en Graupera me n'ha dit de totes! M'ha dit roi, m'ha dit gasiu, m'ha dit ranci, m'ha dit estafa.

Però ha estat una bona lliçó; ha estat un escarment. Sí, en bona refè! No m'hi atrapàran mai més, a ésser generós! Perquè és allò que diu la Quima: a ésser generós *què s'hi guanya?*

JOSEP CARNER

Inspiron al çiuj por la gloro de nia Literaturo!

Eduard KUNHL, *prezidanto*.—D-ro. Josep CASANOVAS.—Josep GRAU.—Teo JUNG.—Julio MANGADA.—Estanislau PELLICER, *sekretario*.

Barcelona, Marto 1921.

NOTOJ

I. La aŭtoro de la plej bona originala versaĵo (*originalaj tekstoj I*) ricevos la volumon pri «Albrecht Dürer» eldonitan de D-ro. Nuchter enhavantan 53 bildojn de la famkonata desegnisto. La aŭtoroj de la ceteraj premiitaj verkoj (*originalaj tekstoj II, tradukitaj tekstoj I, II*) ricevos binditan ekzempleron de la verko «Sinjoro Tadeo» pola epopeo de Adam Mickiewicz, majstre tradukita de Antoni Grabowski.

Krome estos donata al çiu jaŭreato bela atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵaj premiitaj verkoj la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto.

IV.—La Festo de la VIII.^a Floraj Ludoj okazos en Girona dum la IX.^a Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la proksiman Oktobron.

V.—Al la manuskriptoj,—kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15.^a de Aŭgusto 1921 de la Sekretario S-ro. Estanislau Pellicer en la sidejo de la K. E. F. (str. Carme, 30, Barcelona).—oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI.—Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniu konkurso.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTOJ kaj per la esperantaj kaj enlandaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represigi.

* * *

En la sekvantaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO aperados la listo de eksterordinaraj premioj kaj temoj.

Kelkaj opinioj

Tre ofte ni aŭdas inter la samideanaro plendojn pro la agadmaniero de kelkaj esperantaj organizaĵoj aŭ gazetoj. Kaj tro ofte ni rimarkas ke kelkaj esperantistoj ne konas bone kiom da malfacilaĵoj prezentigas ĉe la plej simpla laborado, nek ankaŭ konscias klare pri tio ke amika konsilo kaj konsekvenca helpemo kaj sinofero valoras praktike pli multe ol kritikema, plej ofte nefruktodona agado.

Por havigi al tiuj kiuj sin sentas reformemaj okazon esprimi klare kaj efike kion ili deziras, ni oferas nian gazeton. Sed, kompreneble, la esprimataj ideoj estas ekskluzive propraj de la opiniantoj kaj ilia apero sur paĝoj de K. E. neniel signifas ke ĝia Redakcio estas konforma je ili.

Inter ni



Estas niaj plej varmaj deziroj la dissemado kaj disvastigado de Esperanto, mi opinias ke la ĝisnuna maniero de ĝia propagando ne tute efikas nek tute elmontras la neceson de la lingvo.

Mi kredas ke ni nesufiĉe konsideras ke, krom esperantistoj aŭ intern-ideistoj, ni estas simple personoj uzantaj Esperanton; kaj mi rimarkis ke dum multaj sin dediĉis al literaturaj aferoj, malmultaj esperantistoj posedantaj specialajn konojn pri io necesa al la homa materia vivado okupis sin diri ion pri sia teknikaĵo.

Ni devas instigi ĉiujn al tiucela laborado por ke ni havu verkojn aŭ tradukaĵojn pri ĉia scienco, arto, metio, k. t. p. Eble tiamaniere ni pli facile altiros la skeptikulojn.

Inter ni bone konata estas la internacieca valoro de la lingvo, sed en la ekstero kelkaj personoj simple supozas kaj eĉ certigas ke ĝi nur estas ŝlosilo kiel multaj aliaj ekzistantaj. Oni diros ke tiuj ne konas nian lingvon nek iam sin okupis pri ĝi; sed ni devas preferi konvinki ilin per la apliko de Esperanto al plej praktikaj aferoj. Ni bone scias ke idistaro ankaŭ simile kriegas ke Esperanto ne taŭgas por sciencaj kaj teknikaj aplikoj, kaj persono vivanta ekster nia rondo kaj indiferenta je afero de lingvo internacia, blinde povas tion kredi.

Tial trudiĝas la neceso de agadŝanĝo por interesigi indiferen-

tulojn kaj oni povas uzi kiel bonajn rimedojn por tiu celo, tiujn de niaj samideanaj gazetoj La Progreso, Esperanto, La Esperantisto, Internacia Socia Revuo, k. t. p. el kies paĝoj estis tradukitaj en diversaj lingvoj kelkaj artikoloj frapantaj pro ne esperantista sed ĝenerala intereso, kaj pro tio ili povis esti publikigitaj sur paĝoj de naciaj ĵurnaloj.

Ĉu ne estus pli konvinka kaj multvalora tiu tasko, ol tiu de niaj gazetoj nur literaturaj?

Neniel per la supraj linioj mi intencis diri ke ni devas flanke delasi nian estimatan literaturon, nedisigebla parto de homa vivo, sed ni devas plej vaste laboradi en la esprimita direkto kaj, laŭ mia opinio, ni venkos tiun nigran kaj potencon ombron kontraŭan al ideo de internacia lingvo plene taŭga je ĉio.

JAUME CLARAMUNT



ENLANDA MOVADO

Girona.—En ĝenerala kunveno okazinta la 13^{an} de Januaro, la Grupo «Ĝerona Espero» elektis la jenan Direktan Komitaton: Prezidanto: Pastro Josep Casanovas; Vic-prezidanto: Casià Costal, direktoro de la «Escuela Normal de Maestros»; Kasisto: Josep Ferrer; Kalkulisto: Jesús Macià; Bibliotekistino: Carme Maymí; Sekretario: Ramón Casademont; Vic-sekretario: Francisco Hil; Voĉdonantoj: Francisca Bernades, Teresa Colls, Anita Coll, Gerónimo Boris, Amadeu Peris kaj Conrad Domènech.

Inter aliaj aferoj, estis pristudata la propono okazigi en Girona la IX^{an} Kongreson de K. E. F.; oni decidis akcepti ĝin kaj atendi la intervidiĝon kun komitatoj de la Federacio por fine prilakti ĉiujn detalojn.

Tia intervidiĝo efektiviĝis la 2^{an} kaj 13^{an} de Februaro kaj en tiu lasta tago, post zorga pristudo de la afero, la Grupo «Ĝerona Espero» aklame akceptis definitive kaj oficiale la gravan proponon.

Kun ĝojo pro la plena interkonsento atingita, oni finis la kunsidon per kantado de la esperanta himno.

Palma de Mallorca.—La «Esperantista Klubo Palma» pretiĝas al denova laborado kaj elektis la jenan novan Direktan Komitaton: Prezidanto: Gabriel Alomar; Vic-prezidanto; Juan Mascarró; Sekretario: Juan Barceló; Vic-sekretario: Montserrat Vich; Kasisto: Francisco Barceló; Bibliotekisto: Antonio Ramis; Voĉdonantoj: Juan Aguiló, Bernardo Rabassa kaj Juan Urgellés.

EKSTERLANDA MOVADO

Britujo.—En London, ĉe «University College», okazis la Naŭa Konferenco de Edukaj Asocioj. La Brita Esperanto-Asocio organizis konferencon pri «Esperanto kiel faktoro pri edukado», kiu estis multnombro ĉeestata de la Konferencanoj.

Germanujo.—En Breslaŭ (Silezio), post enkonduko de la libervola instruo de Esperanto, anoncis sin 1.800 infanoj por lerni la internacian lingvon. En Chemnitz ankaŭ sin anoncis ĉirkaŭ 1.000 infanoj. Novaj kursoj komenciĝis en Neukölln, Horrem, Krefeld kaj Dobritz a: Dresden.

Italujo.—En Milano, dank' al la fervora subteno de la Urbesstro, oni malfermis 25 esperantajn kursojn por geknaboj 10-12 jaraj.

Rusujo.—Gazeto «Izvestja» raportas ke oni enregistras ĉiujn esperantistojn loĝantajn en Moskvo. Poste okazos kunveno kaj oni reorganizos la Moskvan Esperantan Societon.

Francujo.—Estas aranĝitaj novaj sukcesplenaj kursoj de nia lingvo en Béziers, Bordeaux, Metz, Versailles, Toulon kaj Ivry-sur-Seine.

Japanujo.—Japanaj samideanoj propagandas Esperanton ĉe la Japana Asocio por la Ligo de Nacioj kaj la Prezidanto de la Asocio, princo Tokugaua, tre multe interesiĝis pri Esperanto. En Tokio, ĉe Uaseda Universitato formiĝis nova Grupo kaj okazas kursoj pri nia lingvo. En Ŝizuoka, ĉe la Urba Muzeo, estis aranĝata esperanta Ekspozicio, kiun ĉeestis pli ol 7.000 personaj dum kvin tagoj. En Taihoku (Formosa) estas speciala kurso por instruistoj.

Bulgarujo.—En la Blinda Instituto de Sofio estis malfermata speciala kurso de Esperanto por blinduloj. Ankaŭ oni lernas nian lingvon en Pleven kaj Kneĵa.

—Novaj kursoj estas ankoraŭ en New-York, Canton, Danzig (libera ŝtato), Kispet kaj Miskolc (Hungarujo) kaj Siedlec (Polujo).

Nekrologio

Kapitanon Josep Domènech Alberich forrabis el niaj esperantistaj vicoj la senkompatema morto en liaj posedaĵoj ĉe Reus post longedaŭra malsano, la 29^{an} de lasta Novembro.

Dum multaj jaroj li trafte bataladis por la realigo de nia homara idealo. En Ĝerono, kie li pionire agadis altirante al si ĉies simpatian, pro sia afableco, li gvidadis multajn kursojn, rekrutinte kaj esperantiginte multenombrian membraron, ĉe la societoj «Amo kaj Espero» unue kaj «Ĝerona Espero» poste.

Li ĉeestis la internaciajn kongresojn de Anvers, Krakovo, Berlino kaj Parizo, saĝe raportante pri ĉiuj antaŭ siaj kunsocietanoj.

Niaj Ĝeronaj gesamideanoj plende kaj solene adiaŭis lin okaze de lia transloĝiĝo al Reus, per amikeca festeno, kaj nun ni ĉiuj bedaŭron profundan sentas pro lia eliĝo el la vivantoj.

Li pace ripozu.—C.

—Je la lasta Decembro mortis ankaŭ la juna kaj fervora samideano Vicens Caballé. Li estis ano de la grupo «Barcelona Stelo», kie li lernis la lingvon kun eksterordinara rapideco, kaj havis intensan korespondadon kun tutmondaj esperantistoj. Pace ripozu la juna mortinto!

Oficiala Parto



OFICIALE ni sciigis la komitaton de Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj en Zaragoza kaj ties subkomitaton de Barcelona, ke nia Federacio aliĝas al ĝi kaj ke la paĝoj de nia organo estas malfermitaj por ĝia propagando.

La 13^{an} de februaro ni triafoje vizitis la grupon Ĝerona Espero kaj ties laboremaj grupanoj akceptis la organizon de la kongreso nunjara, kiu okazos dum aŭtuno (15-17 de oktobro) pro tio ke printempe ni havos la kunvenon en Zaragoza, al kiu ni devas liveri nian tutan kunhelpon por plej granda sukceso.

Ni ricevis ankoraŭ subtenon de jenaj samideanoj :

KAPITALO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

DUA LISTO

Antaŭa sumo	Ptoj. 500'—
2. ^a donaco de «Barcelona Stelo»	> 5'—
2. ^a » » Pastro J. Planas	> 5'—
S-ro. S. Ortega	> 10'—
» Josep Albagés	> 10'—
» Josep Ventura	> 10'—
Pastro Angel Garriga	> 10'—

Sumo Ptoj. 550'— (Daŭrigota).

Krom tio, Esperanta Societo Paco kaj Amo kaj Grupo Barcelona Stelo, donacis po 20 pesetoj por helpi la presigon de 10.000 propagandfolioj, kiujn ni donis al la Oficiala Foiro de Specimejoj de Barcelona.—LA SEKRETARIO S. A. J.

Bibliografio

DEKLARACIO DE LA AKADEMIO (Decembro 1920).—Por ni, sincere kaj senkondiĉe disciplinemaj fundamentanoj, tiu oficiala dokumento de nia plej alta lingva institucio estas gajiga pruvo pri ties vigleco, post la baroj kaj malhelpoj de ĉiuj konataj. Ni esperas ke ĉiuj esperantistoj, post legado de tiu Deklaracio, konsentos pri la *difino kaj devoj de la Esperantistaro* kaj tute fidos al la Akademio kiu tiel majstre al ili prezentas la difinon kaj devojn de la Lingvaj Institutioj.

CINDRULINO kaj aliaj Teatraĵetoj por la infanoj, de Louise Briggs.—Jen areto da beletaj infanteatraĵoj kiun Brita Esperantista Asocio eldonis, riĉigante per ĝi la esperantan literaturon. Tial ke multaj el la katalunaj esperantistoj eble legis jam «*Belulino kaj la Besto*», premiita en niaj Internaciaj Floraj Ludoj kaj publikigita sur «Kataluna Esperantisto», mi povas min konsideri liberigata el la devo laŭdi la eldonajon, kaj nur mi diros ke ĉiuj verketoj konsistigantaj ĝin estas, de la lingva vidpunkto, same korektaj kaj rekomendindaj.

VIRINOJ VI KUNIGU VIN, MILITU KONTRAŬ MILITON.—Estas la subtitolo de arta, sentiga poŝtkarto, eldono de Esperanto-Ollicejo, Stuttgart. Ĝia aŭtoro sukcesis, per ĝi, grafike esprimi la militan malindecon trafe instigante la virinan malamon kontraŭ militon.—KATONO.

Korespondado

Gesinjoroj : Victor O. Allende, Bilbao; Louise Briggs, Armley; E. F. Cense, Paris; E. Grosjean-Maupin, Saint-Maurice; Pierre Corret, Versailles; P. Christaller, Stuttgart.

Ni estas tre dankaj al viaj gratuloj, kuragigoj kaj bonvolaj laŭdoj; ni klopodos ke nia gazeto meritu ĉiam vian estimon.

GRAVA AVIZO

La Administracio de K. E. F. rekomendas al tiuj ne paginta ankoraŭ la jarkotizon, ke ili ne prokrastu fari tion.

La izolitaj federacianoj estas petataj bonvole sendi ĝin al nia sidejo, Carme, 30, pral.

Anoncetoj pri korespondado

(Por ĉiu anonceto oni devas sendi 0'50 ptojn. aŭ 2 respondkuponojn).

S-ro. Emeterio Ortega

str. Jaume Giralt, 33, tda.

Barcelona (Hispanujo)

deziras interŝanĝi il. pk kaj pm.

S-ro. Bernabé Mira

str. Diputacio, 18-4.^o-1.^a

Barcelona (Hispanujo)

ilustritajn pk. kaj pm.

S-ro. Kurt Luell

Nostiz-Wallwitz-Str. n.^o 6

Leipzig Gr. Zsch. (Germanujo)

ilustritajn pk. kaj esp. gazetojn.

Ni petas al la renaskiĝantaj Grupoj ke ili sciigu denove sian aliĝon al K. E. F.



Oni devas celi la restarigon de la antaŭaj Grupoj en nia lando!